4-a Jaro. N-o 163 APERAS  SEMAJNE 17. Novembro 1927

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

ĤAOSO EN BRITIA KARBMININDUSTRIO

La ĝenerala vivo de karbministoj en Britio ĉiam estis mizera, unutona kaj minacata de la malsato, senlaboreco kaj antaŭtempa morto. Sed de post la granda "lokaŭto" de la lasta jaro la stato de la karbministoj plimalboniĝas senhalte. La retrovo de merkatoj kaj rebonstatigo de la karbminindustrio (per kiuj promesoj la minejestroj trompis la britian Laboristaron) ankoraŭ ne iĝis faktoj. La rezultoj de la deviga okhora labortago estas nur troa produktado, parta senlaboreco kaj la tuta laborĉeso en la malnovaj minejoj, kiuj ne povas konkuri kontraŭ la modernaj bon-ekipitaj.

En Blaengwynfi (Blejngŭinvi), malgranda karbonproduktanta vilaĝo en Glamorganshire, Kimrio, la tuta loĝantaro el 450 familioj estas senlabora, ĉar neniuj el la apudaj minejoj rekomencis la funkciadon de post la "lokaŭto". Sekve la fantomo Malsato ŝteliras en ĉiun domon. Multaj el la enloĝantoj jam forlasis la vilaĝon por serĉi laboron aliloke. Tie oni formortas kiel muŝoj, kvar samstratanoj estis enterigataj dum unu semajno.

En Gwendraith Valley (Gŭendrait-Valo) multaj ministoj en la antracita regiono estas devigataj peti monhelpon ĉe la pormizerula administracio. Ili ne nur devas elporti partan senlaborecon, sed eĉ devas repagi la monhelpon pagitan dum la striko. Sekve multe da antracitministoj portas hejmen de ses pencoj ĝis tri-kvar ŝilingoj, per kio oni devas aĉeti nutraĵon, vestaĵojn kaj pagi lupagon. En Lancashire en karbminejaj urboj miloj da ministoj vagas malgaje sur la stratoj, ŝuldoj amasiĝas. Butikistoj kaj komercistoj plendadas oftege pri la malbona stato de la industrio kaj de l' komerco. En ĉiu karbregiono de Britio troviĝas malsato, malriĉegeco kaj malkontento. Sed ankoraŭ pli malbona situacio minacas nin. Pro la malvenko de la lastjara konflikto la britia minista federacio preskaŭ disrompiĝis, kaj certe ĝi restas tute senpova, ĉar la lokaŭto finiĝis per regionaj interkonsentoj, kiuj finiĝos je diversaj datoj kaj periodoj.

Jen estas tabelo de la tempdaŭroj kaj finiĝdatoj de la interkonsentoj:

Regiono	*Tempodaŭro*	*Finiĝdato*
Durham	1 jaro	30. 11. 27
Northumberland	2 jaroj	14. 1. 29
Skotlando	3 jaroj	30. 6. 30
Yorkshire	3 jaroj	31. 12. 29
Sud-Kimrio	3 jaroj	31. 12. 29
Lancashire kaj Cheshire	3 jaroj	31. 12. 29
Forest of Dean	3 jaroj	15. 12. 29
Cumberland	3 jaroj	28. 11. 29
Suda Derby	3½ jaroj	30. 6. 30
Warwickshire	4 jaroj	31. 12. 30
Suda Staffordshire	4½ jaroj	30. 6. 31
Derbyshire	5 jaroj	31. 12. 31
Nottinghamshire	5 jaroj	30. 11. 31

Cetere, ekzistas varieblaj kondiĉoj rilatantaj la necesan tempavizon, kiu nepre antaŭiras la finigon de la interkonsentoj. Ĉio ĉi tute malhelpas komunan agadon flanke de l' regionaj ministaj unuiĝoj.

Ekzemple Durham jam atingas la finon de sia interkonsentdaŭrado. La minejposedantoj en Durham deziras ankoraŭ malplialtigi la salajron. La mizero en Durham estas apenaŭ kredebla. Se la britia ministaro daŭrigos sian laboron dum Durham estos lokaŭtata, do ĝi mem fariĝos strikrompanto. Ĉiu regiono helpos disrompi la strikon de la alia.

Kion fari?

La britia minista federacio kontentiĝas propagandante 100%-an aliĝon al la federacio.

Lancashire jam postulis, ke la ekzekutiva komitato de la britia minista federacio kunvoku necesan konferencon por esplori la tutan situacion.

Ĉu oni defendos Durham, aŭ ne? Tio dependas sole de la simpatio aŭ apatio de la tuta ministaro mem.

W. Henthorne (7382).



Situacio de elektrolaborantoj en Zagreb

La elektro-industrio mem ĉe ni ankoraŭ ne estas disvolviĝinta kaj preskaŭ ĉiuj elektro-teknikaj produktoj estas importitaj el eksterlando. Tial nia medio estas sufiĉe mallarĝa kaj niaj laboroj konsistas ĉefe en la prilaborado de importitaj produktoj, servo ĉe elektrejoj, riparado de elektraj maŝinoj kaj aparatoj.

Niaj salajroj estas tre diversaj: En la urbo mem ni ricevas, komencante de malgrandaj metiistoj ĝis la grandaj firmoj, 3.50—12 dinarojn hore. Se ni estas senditaj al laboroj ekster la urbo, tiam ni ricevas kelkajn aldonojn kaj la salajro atingas 8—15 din. hore. La lastaj ciferoj koncernas nur la bonkvalifikitajn laboristojn. De supra salajro oni deprenas 3,5%-an imposton por manlaboristoj, sed ni jam povas flari, ke la ŝtato tiun imposton deziras plialtigi ĝis 6%. Similan sumon oni deprenas ankoraŭ por malsanula asekurado, do sume ĉirkaŭe 7%. La muntistoj multe suferas p-

sezonaj laboroj. Se komencas en iu loko pli granda laboro, oni dungas laŭbezone, sed se la laboro estas finita, aŭ eĉ interrompita pro manko de materialoj, kiujn ni ricevas el eksterlando, tiam ni estas simple maldungataj. Aŭ oni ricevas, kiel ekzemple ĉe mia firmo, libervolan subtenon de 18 din. tage, dum oni por manĝaĵo bezonas 25 din. Sed eĉ tio koncernas nur la bonkvalifikitajn.

Ja subteno por senlaboruloj ne ekzistas, krom tiu de fakorganizoj. La labortempo estas fiksita je 48 horoj semajne, sed tiu aranĝo ĉiam pli kaj pli malaperas pro granda senlaboreco. Ekzemple iu devas ricevi por eksterordinara laboro 50%-an aldonon, por nokta kaj dimanĉa laboro 100%-an. Sed oni povus konstati, ke eĉ K-doj en eltenebla pozicio tute senpripense sin proponis libervole al eksterordinara laboro je normala horsalajro. Ĉe malgrandaj firmoj tiuj aldonoj entute ne estas atentataj. Sed la konduto de niaj mastroj montras al ni ĉiuj la irendan vojon. Tial lastatempe la sindikata movado pliviglĝis kaj la fortoj tiom kolektiĝis, ke ni povis komenci intertrakti pri starigo de kolektiva kontrakto. Per tiu ĉi kontrakto ni esperas havigi al ĉiuj elektrolaboristoj samajn plibonigitajn laborkondiĉojn. Mi ankoraŭ menciu, ke la sindikata movado ne estas unueca, sed apartigita en la "Unuigitaj sindikatoj", kiuj apartenas al Amsterdam kaj "Sendependaj sindikatoj", kie kolektiĝas radikaluloj. La forto de tiuj du organizoj ŝanĝiĝas laŭloke. Krom tio ekzistas ankoraŭ ŝovinista laborista ligo, sed tiun ĉi ni eĉ ne devas konsideri.

La prezoj estas jenaj: 1 kilogramo da pano kostas 5—6 dinarojn, porkaĵo 25 din., graso 38 din., sukero 15.50 din., butero 50 din., mezkvalita vestaĵo 1 300 din., paro da ŝuoj 350 din.; por meblita ĉambro, kie ni plejparte loĝas duope, ni devas pagi sume 500—700 din. monate.

Kiel tiuj K-doj kun la pli malgranda salajro vivaĉas, tion ni facile divenas.

Vekiĝemulo (6083).

VORTARO
DE
ESPERANTO



de **KABE (Dro K. BEIN)**

Ĉi tiu internacia vortaro, verkita plene en esperanto, enhavas ĉiujn vortojn de nia lingvo (radikajn kaj devenigitajn), ĝenerale uzatajn de l' esperantistoj, kun esperanta difino de ilia rekta senco kaj iliaj ĉefaj figuraj signifoj. Ĉiu vorto estas difinita kun granda precizeco kaj mirinda klareco. Multaj frazmodeloj por klarigi la sencon de la vortoj kaj igi ilin memoreblaj, faras la verkon alloganta kaj vivanta.

Unu luksa volumo in-8, bindita, 175 pĝ.

Prezo: 2.20 mk. g. inkluz. sendkostojn.

ADMINISTRACIO DE SAT.

VIVO EN LA USONA ARMEO

de Paul Crouch

(Verkita speciale por "S-ulo")

Nur laŭŝajne havas Usono armeon de volontuloj; efektive la junuloj estas devigataj eniri ĝin pro ekonomia neceseco. Amerika prosperstato estas nur kvazaŭ mito, kun escepto, kiam ĝi koncernas la superajn klasojn kaj la kelkcent-mil gelaboristojn, kiuj povas ricevi bonsalajran laboron. (La skribanto trovis, ke la dung-problemo estas precipe akuta en kaliforniaj urboj.) Sed eĉ malsato ne estus deviginta multajn



Crouch

el tiuj laboristoj eniri la armeon, se ili estus sciintaj la efektivajn faktojn pri la armea servado.

La varb-oficiroj, penante logi homojn al la armeo, ne detenas sin de mensogoj. Ili promesas al estonta soldato nutraĵon, vojaĝadon, edukadon kaj distradon. Li ricevas bonan pozicion laŭ kapitalista vidpunkto — malfacilan laboron kaj ne tro malmulte da ĝi. Li estas devigata elspezi grandan parton de sia malgranda salajro por armeaj celoj. Li ricevas ordinaran vestaron por laboro, kaj la *devigon aĉeti* tajlorfaritajn uniformojn je amortiz-sistema repagado. En multaj rotoj, soldatoj estas invitataj kontribui al monprovizo, kiu estas fondata por aĉetado de pli bona nutraĵo ol tia, kian la registaro provizas. Dum milito la registaro, kompreneble, devas oferi al la soldato sufiĉan vojaĝadon por sendi lin en tranĉeojn, kie li mortigas aŭ eble estas mortigata. Post varbiĝo, li estas sendata al la loko, kie li estas postenigota kaj pret-tenata por la bezono de imperialismo usona.

Dum mi estis sub la estreco de armeo, mi vojaĝis, pli-malpli, naŭ mil mejlojn je la kosto de la registaro — kosto, kiu estas eble egala al tiu de pork-transportado por la sama distanco. Dum la longedaŭra, ocean-vojaĝo, de Nov-Jorko al Honolulu, ni estis traktataj kiel brutaro. Centoj da ni devis dormi en unu ĉambrego, malproksime profunde, sub la ferdeko de transport-ŝipo armea. Ni havis etajn kanvas-hamakojn, unu super la alia; tiamaniere la ĉambrego estis vere plenigita, de la supro ĝis la fundo. La varmegeco estis sufoka. Vojaĝado kiel soldato estis eĉ pli malbona ol la vivo en Alcatraz kiel malliberulo.

Dum la horoj matenaj, la usona soldato estas milit-ekzercata. Posttagmeze li devas surmeti sian laborist-vestaron kaj, sub kaporalo kiel mastro, estas devigata plenumi malfacilan laboron. Sed tio ne estas ĉio. Vespere li devas poluri sian ekipaĵon, briligi ĉion kaj ofte li estas laborigata en kuirejo, aŭ estas je gard-deĵoro dum dudekkvar horoj. Eĉ pli malbona ol la korpa stato de cirkonstancoj estas la intelekta ĉirkaŭaro en la armeo. Oni precipe kontraŭas, ke soldato lernu pri aliaj nacioj. Se li leguŝ pri subpremo en aliaj landoj, li povus ĝin kompari kun sia propra sklaviĝo kaj ekkompreni, ke li staras sur komuna nivelo kun la laborista klaso en aliaj landoj imperialistaj — ke li havas nenion por perdi krom siaj ĉenoj kaj la mondon por gajni.

Nenie estas klas-malsameco tiel evidenta kiel en la armeo. Kun escepto de absolute necesa okazo, pro kaŭzo armea, al soldato ne estas permesate rompi la definitivan klas-linion kaj alparoli oficiron — se li unue ne ricevis permeson de sia unuagrad-serĝento. Poste, turniĝante al oficiro, li ĉiam devas alparoli lin en la tria persono — kvazaŭ al reĝo. Dume li devas rigide stari je atento. La vorto "vi", se alparolita al oficiro, estas konsiderata kiel nepardonebla ofendo. Kaj ne gravas, kiom insultanta la oficiro iĝas, la soldato ne povas respondi alimaniere ol "Jes, sinjoro". Ekzemple, oficiro de Alcatraz gard-roto, post kiam li vulgare misuzadis soldaton, diris: "Vi scias, ke vi ne taŭgas kiel soldato, ĉu ne?" "Jes, sinjoro", estis la humila respondo. "Vi scias, ke vi estas hundaĉo, ĉu ne?" Ree, "Jes, sinjoro". La kaŭzo estis, ke la soldato ne povis kompreni la manieron per kiu la oficiro volis fari iun taskon.

La soldatoj dependas de indulgo de siaj oficiroj kaj povas esti malliberigotaj por longaj tempospacoj sen iu kaŭzo. En tiuj malliberejoj, soldatoj estas ofte traktataj pli malbone ol mortigistoj porvive kondamnitaj. Usonaj soldatoj en

Hawaii-insuloj estas tiel severe traktataj, ke multaj provas forkuri el la armeo kaj la insularo. Sed ŝipoj, kiuj forlasas Honolulu estas zorge observataj kaj armeanoj, kiuj provas liberiĝi, estas kondamnataj al ses-monata enkarcerigo en la "Posta Palisaro" de Schoefield-kazerno. Vivo tie spitas imagkapablon. Ĉe laboro la ordono estas: "Kapoj malsupren, dorsoj supren, funkciigu la pikilojn!" Tiuj, kiuj forgesas la ordonon, eĉ dum sekundo, estas pliege laborigataj. Dum ili estas inter la muroj karceraj, ili devas sidi sur la planko. Kiu ajn kantas aŭ fajfas, tiu estas metata en izolan ĉelon por sep tagoj, sen nutraĵo alia ol pano kaj akvo. Neniu legaĵo, kun escepto de religia literaturo dimanĉe, estas permesata. Leteroj estas liveratai dimanĉe kaj oni devas detrui ilin la proksiman tagon. Se soldato-malliberulo estas trovata kun gazeto aŭ provas teni leteron de sia patrino aŭ de aliaj parencoj, li estas metata en karceron kun pan- kaj akvo-dieto por unu semajno. La malliberulo eĉ ne havas dimanĉon por ripoztago. Matene li devas sin prepari por inspekto, kaj posttagmeze li devas submetiĝi al dozo da religia opio, kiun enigas pastro armea.

Multaj aŭ la plejmulto el la malliberuloj ne estas krimuloj. Ili estis enlogitaj en la armeon per malveraj pretekstoj kaj pro malespero ili provis forkuri el la kaptilo.

La 19-an de februaro 1925, la skribanto kaj multaj aliaj soldatoj estis arestitaj pro membreco en la Hawaii Ligo Komunista, kiun ni organizis en la armeo, celante instrui niajn K-dojn soldatojn pri la klasbatalo. Dum semajnoj ni estis tenataj sen permeso de komunikado kun iu ajn ekstere kaj sen iuj ajn akuzoj kontraŭ ni. Ĉar ni rompis neniun armean nek civilan leĝon, sufiĉa tempo kaj peno estis necesa por trovi artifikojn, kiuj ebligus akuzi nin en armea juĝejo. En aprilo 1925, Walter Trumbull kaj mi estis juĝataj per la jenaj akuzoj: 1. ni persvadis spionon registaran aliĝi nian organizon, kvankam al li estis ordonite fari tion de la armeaj estroj; 2. ni skribis leteron al la Komunista Internacio. Mi estis kondamnita al 40-jara malliberigo kun malfacila laboro kaj Walter Trumbull ricevis 26-jaran kondamnon. Aliaj anoj estis senhonore eksigitaj el la armeo. Eble la mondampleksa protesto de la Laboristaro, kiu okazis tuj post la kondamnoj kontraŭ K-do Trumbull kaj mi ŝirmis la aliajn membrojn de longedaŭraj karcer-kondamnoj. La protesto laboristara devigis la usonan registaron malpliigi mian 40-jaran kondamnaĵon al tri jaroj kaj la 26-jaran de Walter Trumbull al unu jaro. Mi estis liberigita el la armea malliberejo ĉe Alcatraz Insulo la 1-an de junio n. j.

Esperantan lingvon uzis la Hawaii Ligo Komunista en siaj propagando-penoj, kaj la gvid-membroj de la H. L. K. estis de Esperanto-lernantoj kun pli-malpli dudeko da studentoj (ĉiuj soldatoj). La kurso donis bonan pretekston por niaj kunvenoj kaj malfaciligis al la estraro ricevi informojn pri niaj penoj. Ni starigis korespondadon kun Japanio kaj aliaj landoj. Sed post nia aresto la armeestroj deklaris militon kontraŭ esperanton kaj konfiskis lernolibrojn kaj literaturon, kiu temis pri la lingvo...

El angla tradukis: *George Saville.*

KRETSCHAM-ROTHENSEHMA

(Kreĉam-Rotenseema)

Ĉarmon elradias la nomo de tiu ĉi loko. Ĝi troviĝas en Ercmontaro (Saksio-Germanio) kaj estas atingebla per vagonaro de Leipzig trans Kemnitz, laŭlonge de la bela Zschopaŭ-valo (Ŝopaŭ-) ĝis Cranzahl (Krancal); de tie per malvastrela vagonaro oni venas al la celo. La tiea ĉirkaŭaĵo kun siaj montoj kaj koniferaj arbaroj, regiono kvazaŭ kreita por resaniĝo de l' korpo kaj por refreŝiĝo de l' spirito el la maltrankvilo de l' mondbruado, estas efektive paradizo por homoj, kiuj ne bezonas labori. Ĝuste agis la "Ĝenerala loka asekur-institucio por malsanuloj de la urbo Leipzig" aĉetante iaman hotelon tie kaj transformante ĝin en *Ripozan Hejmon.* Estas sendataj tien malfortaj personoj, suferintaj gravan malsanon, akcidenton aŭ operacion kaj bezonantaj nervan ripozon. La asekur-institucio pagas dum tri semajnoj ĉion, kaj la edzino de la ripozulo ricevas krome trikvaronan parton de la kutima subvencio, kiun la membro ricevas, kiam li hejme estas malsana. La needziĝintaj ricevas nur kvaronan parton de la subvencio.

La Ripoza Hejmo konsistas el du domoj, staloj, parko kaj iom da kampo. Tiuj du domoj loĝigas krom la administrantaro ĉirkaŭe kvindek personojn nur virseksajn en ĉambroj kun unu, du aŭ tri litoj. Krome ekzistas manĝsalono, legkaj ludĉambroj. Ĉio, la ripozuloj samkiel la tuta hejmo kun kampo kaj brutaro, estas administrata de unu administranto, edzino kaj kvar — kvin gehelpistoj, kiuj helpas en la domo, kuirejo kaj sur la kampo.

Nun iom pri mia tiea restado: Kvankam jam en decembro 1926 mia kuracisto faris kaj forsendis la petskribon al la koncerna instanco, mi sukcesis kaj havis la feliĉon esti en la vico nur fine de julio 1927 pro la granda nombro da aspirantoj. — Do, la 27-an de julio 1927 je la 9.30 h. kolektiĝis en la ĉefstacidomo de Leipzig 53 tute nekonataj inter si homoj, kelkaj akompanataj de siaj edzinoj kaj infanoj kvazaŭ por adiaŭi ilin kiel dum milito. Ili apartenis al la plej diversaj profesioj. Tie ĉiu ricevis sian veturbileton, kaj unu el ni, kiu estis oficisto de la asekur-oficejo kaj ankaŭ partoprenis refreŝiĝon, ricevis krome komunan ateston, sen kiu niaj biletoj estis senvalidaj. Do, ĉiuj devis resti kune ĝis la celo. Nun ni veturis. Estis malserena mateno. Pro nebulo oni preskaŭ povis vidi nenion de la belaj pejzaĝoj, kiujn preterveturegis nia vagonaro al Kemnitz, Krancal, Kretscham-Rothensehma, kie ni alvenis je la 14.50 h.

Alveninte tie, pluvegis. Ni estis akceptitaj de la administranto de la hejmo kaj preskaŭ kurmarŝis ĝis la domo ne pli ol kvin minutojn. Demetinte niajn kofrojn kaj valizojn ni estis kondukataj en la manĝsalonon, kie sur tabloj jam atendis nin posttagmeza kafo kun bone ŝmiritaj buterbulkoj. Post tiu unua manĝo ĉiu reprenis sian pakaĵon kaj estis kondukata en sian ĉambron. Se la reciproke inter si nekonataj homoj provis iom alproksimiĝi jam en la vagonaro dum la vojaĝo, tio okazis nun des pli, kiam evidentiĝis, ke du aŭ tri personoj devis kunloĝi en unu sama ĉambro.

Post ĉirkaŭe trihora restado, pro pluvo, en la hejmo, ni ricevis la por tagmezo destinitan varman manĝaĵon. Ĝi estis tiel bongusta kaj abunda, ke ĉiuj kontentiĝis. Je la 21-a h. ĉiuj enlitiĝis (tion postulas la regularo) kaj estis vekataj la alian tagon matene je la 6.30 h. Nun komenciĝis la kutima vivo en la hejmo. Ĉiu ordigis sin kaj sian liton, kaj horon poste vokis la sonorilo al unua matenmanĝo. Post tiu manĝpaŭzo nun ĉiuj estis liberaj; formiĝis grupetoj al ekskursetoj.

Ni havis la feliĉon, ke la kvindek kvara ripozulo (70-jara tajloro) jam ĝuis sian restadon dum unu semajno tie, kaj li jam estis sufiĉe bone informiĝinta pri la vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo por tuj surpreni la gvidadon. Tiamaniere ni vizitis unue la "Siebener Muehle" (Zibener mjŭle), malgranda muelrado sur rivereto en arbaro, konstruita de iam tie ripozantaj Leipzig-anoj. Je la 9-a h. ĉiuj rekolektiĝis en la manĝsalonon por preni la duan matenmanĝon. Post tiu dua matenmanĝo ni riskas jam ekskursi pli malproksimen kaj suriras monton: Toska Bank. De tie oni havas tre bonan perspektivon kaj povas vidi la montojn Keilberg, Fichtelberg, Baerenstein, Poehlberg kaj malproksimen en la boheman landon. La tuta vojo kondukas tra koniferа arbaro kaj estas parte kovrata per ŝtonoj brilantaj kiel pura erco[1]). Nun reveninte en la hejmon precize je la 12-a h. ĉiuj el ni okupas denove sian saman sidlokon por komuna tagmanĝo. Post tiu tagmanĝo estas permesate iri en sian ĉambron por dormi al tiu, kiu tion deziras; sed kiu preferas promeni en arbaron, por tiu ne ekzistas alia ordono. Tamen precize je la 16-a h. ĉiu devas ĉeesti la

[1]) Erco — neprilaborita metalo, metalhava ŝtonaĵo.

posttagmezan kafopaŭzon. La sama estas por la vespermanĝo. Je la 21-a h. enlitiĝo. Tiel oni pasigas la tagojn per promenoj, ekskursoj kaj manĝoj.

Dum tiuj ĉiutagaj promenoj oni havas okazon konatiĝi kun la regiono kaj enloĝantoj. Kaj se jam en la komenco estas dirite, ke tiu peco da tero estas idilia edeno por tiuj senlaboruloj, kiuj havas la rimedojn por plezurvojaĝoj aŭ sportaj celoj, des pli peniga estas la vivo por tiuj, kiuj ne estis sufiĉe singardaj en la elekto de siaj gepatroj kaj trafis nur en proletan familion.

Plejmulte regas agrikulturo, brutbredado kaj hejmindustrio, kio estas ne tre profitdona, se oni konsideras la tre malbone kultureblan teron en la ŝtona montaro. Tre nefruktodona estas tiu regiono parte ankaŭ pro la malvarmaj nordventoj, kiuj haltigas ĉiun kreskadon, dum sur la kontraŭa flanko, en Bohemio, regas fruktodoneco tiel, ke oni volonte vendus malkare agrikulturajn produktojn trans la limon, se la doganejo de la germana registaro ne malpermesus tion. Do, escepto ne estas, prefere malsatiĝu la popolo. La hejmlaboruloj produktas pasamentojn kaj teksaĵojn. Kvankam eĉ la infanoj helpas en tiu hejmindustrio, la gajno estas tre minimuma. Kelkaj havas la feliĉon trovi okupon en urbo kaj ili veturas du horojn matene per vagonaro al la laborejo en Annaberg kaj vespere denove ofero de duhora reveturo. Tion por ricevi salajron de 58 pfenigoj hore.

Estas kompreneble, ke sub tiaj cirkonstancoj suferas la kleriga okupo. La eklezio regas ankoraŭ ĉion. Jen pruvo: mortis unu el niaj Leipzig-anoj (63-jarulo) dum ekskurso en Oberwiesenthal (Oberwizental), konata loko pro siaj vintraj k. a. sportoj, kiun partoprenas kutime nur nobelularo. La vidvino de la mortinto pro manko de monrimedoj ne povis pagi transporton de la kadavro al Leipzig. La mortinto estis ateisto, sed ne organizita en liberpensula organizo. La tombejo en Oberwiesenthal apartenas al la eklezia societo kaj ne estas permesate entombigi tie seneklezianon. Do, ni *devis silenti* kontraŭ la pastro pri la neaparteneco de la mortinto al eklezio *kaj* devis *toleri* kantadon de piaj kantoj de knabaro kaj ankaŭ la *predikon de la pastro* nur por ricevi la permeson por entombigo. Nur tiamaniere ni sukcesis entombigi seneklezianon en tombejon.

Estas ankoraŭ menciinde, ke ĉiu membro de la "Ĝenerala loka asekur-institucio por malsanuloj de urbo Leipzig" rajtas pretendi la restadon en iu el ĝiaj Ripozhejmoj post ĉiuj du jaroj.

SAT-ano 125 (Leipzig).



Kooperativa movado en Germanio

(Kelkaj nombroj)

1. La Centra Asocio de Germanaj Konsumunuiĝoj nombris en jaro 1926 3 440 000 membrojn (1925: 3 364 000, 1914: 1 717 000). La lastjara vendsumo estis 811 milionoj mk. (1925: 702, 1914: 493 milionoj mk.). Do, en 1926 ĉiu familio de la aliĝintaj unuiĝoj aĉetis meznombre por 253 mk. varojn. La akcia kapitalo donita de la membroj estis en 1926 35 milionoj mk., ĉiu membro po 11 mk. oni ŝparis 138 milionojn mk. en 1926 ĉe la unuiĝoj.

La ŝajne ne granda kresko de la nombroj en 1926 kompare al la nombroj en 1925 rezultas el la fakto, ke oni dum la lasta jaro multajn milojn da anoj eksigis tial, ke ili ne pagis la devigan akcian parteton. Konsiderante tion, oni eĉ povas konstati ĝojigan kreskon de la kooperativa movado en Germanio.

Krom la ĉefa Centra Asocio ekzistas ankaŭ Regna Asocio de Germanaj Konsumunuiĝoj, kiu ampleksas kvaronon de la Centra Asocio.

2. La kompanio de germanaj konsumunuiĝoj por pogranda aĉetado (GEG) per propraj pogranda komerco kaj pogranda protuktado prizorgas komercaĵojn por la unuiĝoj aliĝintaj al la GEG (pli ol 1000). La GEG posedas 42 proprajn fabrikojn, 12 deponejojn por koloniaj produktaĵoj, po 1 deponejo por vestaĵ- kaj ŝuvaroj kaj por kuirilaro kaj mastrumilaro. La vendsumo de GEG en 1926 estis 294 milionoj mk. (1925: 228 milionoj mk.). El komercaĵoj produktitaj en propraj entreprenejoj entenantaj 4700 laborulojn, oni vendis en la lasta jaro por 45,7 milionoj mk. (1925: 35,3). La produktejoj de GEG funkcias laŭ la plej modernaj kaj higienaj principoj. Krome GEG havas propran bankfakon por reguli la siajn pagojn kaj tiujn de la konsumunuiĝoj. *(3018.)*

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo sesa)

Kiel oni vidis, unue regas nur la kutimo, kiun kreis la kredo je totema forto komuna al ĉiuj klananoj. Post longa procezo kaj plej diversaj aliiĝoj okazas, ke tiu disa forto koncentriĝas en la manojn de unu sola persono. Sed la principo restas tamen la sama. La estro ĉerpas sian regecon el la komuna totema forto; neniu regato ja kredas, ke la reganto akiris sian estrecon per propra kapableco, per propra merito. La regeco havas sian radikon en la internaĵo de la societo. Se ne estus tiel, restus nekomprenebla la fakto, ke homo, eĉ plej lerta kaj forta, povas trudi sian volon al tuta kolektivo.

"Rilate la personan superecon de la estro, diras Durkheim, ĝi ludas en tiu procezo nur akcesoran rolon. Tiu supereco klarigas kial la kolektiva forto koncentriĝis en iujn manojn prefere ol en aliajn, sed ĝi ne klarigas ties intensecon. Ĉar tiu forto, anstataŭ resti disa, delegiĝas, tio povas okazi nur je la profito de individuoj, kiuj iarilate montris superecon. Sed tio vidigas nur la direkton de la fluo kaj ne ĝin kreas…"

Ŝtofon ja bezonas la estreco por kreiĝi; tute ne sufiĉas la nura volo de la estriĝanto. Tiu volo estas nur akcesora kaŭzo. Sed ni ankaŭ devas ne forgesi la instruojn de la Historio, nome ke akcesoraj kaŭzoj havas iafoje grandegan efikon. Nenio estas malpli simpla ol sociaj fenomenoj. Nepezeblaj fortoj ludas en la vivo de la socioj ne malatentindan rolon.

Fetiĉismo

Se la *mana*-o povas koncentriĝi en unu solan personon, kiu fariĝas estro, la simpla logiko de la primitivulo ankaŭ facile konsentos pri koncentriĝo de tiu sama forto en iun objekton, kiu bilde reprezentos la totemon. Tiel per natura idea evoluado aperas la fetiĉo, kaj tiu fetiĉo fariĝos la dio de la klano aŭ de grupo el klanoj. Per la rimedoj (potlaĥoj kaj malprofaniĝo en kunfrataro), kiujn ni priskribis antaŭe, la estro akiros la fetiĉon. Sekve estas ankaŭ tute normale, ke la homo, kiu posedas la fetiĉon, la diaĵon, povos finfine proprigi al si ĝian *mana*-on kaj tiel fariĝi mem dio. Tiam la fetiĉo fariĝas nur simbolo, emblemo de la totemo, de la dieco.

Ĉe tia stadio la societo atingis la reĝan tipon. La reĝo absorbas la diojn de la tuta lando, heredas ilian magian forton, iliajn riĉaĵojn kaj fariĝas respondeca pri la vivo kaj nutraĵo de la homoj, fariĝintaj liaj regatoj.

Tiuj ĝeneralaj trajtoj pri la evoluado de la homaj grupiĝoj renkontiĝas ĉe ĉiuj primitivaj popoloj. Restas neklarigita — kaj eble neniam klarigebla — la kialo pri la kredo de la klananoj je totemo. Ŝajnas al mi tro riske hipotezi sur tiu kampo. Ni prefere restu ĉe la firma grundo de konstatitaj faktoj kaj rimarkigu nur, ke ekzistas konstanta paralelismo inter la evoluado de la vivkondiĉoj kaj tiu de la ideoj. Se la klanoj, ekzemple, restus ĉiam nomadaj, kredeble neniam la estriĝo de individuoj povus okazi.

Mi ankaŭ ne hipotezos por klarigi, kial kelkaj klanoj unue fiksiĝis kaj formis teritoriajn grupiĝojn, dum aliaj daŭris esti nomadaj. Ĉu la ideoj ludis ian rolon en tio? Aŭ ĉu nur materiaj ŝanĝiĝoj en la medio aliigis la ideojn? Mi emas pensi, ke ambaŭ kaŭzoj efikis.

La socia vivo ĉe la antikvaj egiptoj

Ni esploretis la socian vivon de la nun ankoraŭ ekzistantaj "primitivaj" popoloj. Temas nun ekrigardeti sur la historion de malaperinta civilizacio nun konsider-

Usonaj ministoj strikadas jam ses monatojn

Pli ol 150 000 ministoj estas devigataj strikadi depost ses monatoj. La minejo-kompanioj tute ne emas fari la plej malgrandan konsenton. Antaŭvideble ili eĉ nun ne tre baldaŭ cedos. Dume la ministaj familioj estas en malespera situacio. Ili staradas senprotekte de leĝoj — kompreneble —, sub la fiĉikanaĵoj de la minejo-posedantoj, kiuj, inter aliaj ĉikanoj, simple ŝtopis la akvokondukon, por ke akvo ĉesu flui en la ministaj loĝejoj kaj kun "bona", laŭleĝa rajto, estas deklarite: "Akvokonduko estas kompania privatposedaĵo; kiu malhelpos nin malprovizi nian akvokondukon?!" ktp. Kvankam multegaj familioj estas sen mono — ŝparaĵoj kompreneble estas jam de longe elspezitaj — la minista unuiĝo-gvidistaro ne permesas pagon de strik-subvencioj kun la motiviga deklaro, ke doni striksubvenciojn estus signo de malforteco. Nur al tute malhavaj familioj estas donataj du dolaroj semajne, kaj eĉ tio neregule. Devigite per tio ministoj forlasis la minejajn distriktojn amase kaj provas havigi laboron en la urbegoj, kie ili ricevas malaltajn salajrojn per kiuj la familioj nek povas morti nek vivadi. La kolektado de subvencioj per helpaj organoj plenrajte de reprezentantoj de ministaj branĉorganizoj eĉ estas malhelpata de la ĉef-oficialuloj de la minista unuiĝo. Sed en Usono tia konduto de gvidistoj de unuiĝoj laboristaj ne estas tiel miriga kiel tio estus en Eŭropo. La politiko de administracio estas sub severaj reguloj antaŭdifinitaj kaj rigide aplikataj de la labor-ĉefoj.

Th. W. (1307).



PRI RACIIGADO

Nuntempe oni diskutas en la tuta mondo pri la raciigado de la produktado. Regas pri tiu demando plej diversaj opinioj en la laboristaj rondoj. Tial ni opinias, ke niaj legantoj legos kun granda intereso la ĉi suban rezolucion voĉdonitan antaŭnelonge de sufiĉe grava organizo.

I.

La delegitoj de la Unuiĝo de meĥanikistoj,

Konstatante la ĝeneraligon de la metodoj de laborado kaj de industria organizado, celantan kreskigi la individuan produktokvanton,

Konstatante antaŭ ĉio, ke la principon de la aplikado de tiuj metodoj la laboristoj ne plu devas blinde kaj simplule opozicii,

Sed, por ke la scienca organizado de la laboro povu esti konsiderata de la laborista klaso kiel progreso, ili opinias tamen, ke ĝi devas respekti la homan faktoron, t. e. la homindecon kaj la justan rajton al vivo de la laboristoj, al kiuj ĝi estas aplikata.

Pro tiu kialo, konfesante la pravecon de ĉiuj saĝaj principoj pri organizado de la laboro, ili deklaras, ke la laboristoj-meĥanikistoj devas lukti energie kontraŭ la sekvoj de la profitemaj kaj tiom maljustaj kiom neperfektaj aplikoj, kiujn firme volas fari la mastraro en la meĥanika konstruado de la Pariza regiono.

II.

Konsiderante, aliflanke, ke la solaj sciencaj progresoj en la regiono de la produktado neniel povas pretendi modifi la principojn de estreco kaj de propraĵo sur kiuj la nuna socio estas starigita, ili opinias, ke la raciigado — scienco koncernanta nur la rilatojn inter la diversaj faktoroj de la produktado — povas ŝanĝi nenion en la kaŭzoj, kiuj kontribuas al la divido de la homoj en posedantoj kaj proletoj, aŭ mastroj kaj laboristoj, unuvorte, en ekspluatantoj kaj ekspluatatoj.

Ĉu la evoluo de la kapitalista ekonomio prenas sciencan aspekton, ĉu ĝi alkutimiĝas al konservado de la reĝimo, ĉiam la kapitalismo daŭras, kaj la produktorimedoj, kiom ajn raciaj ili fariĝus, ne malpli multe restos pro tio en la manoj de siaj nunaj posedantoj.

Tial, kontraŭ la kapitalismo, kiu akiras ĉiutage pli grandan tiranecan forton, la laborista movado devas resti fidela al si mem, al sia principo komenca de organizado, de rajtopostulado kaj de agado samkiel al la subtilaj idealoj, kiujn ĝi fiksis al si.

Nenio do povas pravigi nune la revizion de la esencaj celoj, kiuj estas ĝia ekzistorajto. Elfrancigis *I. H. K.*

(Finota.)



NIA VIVO

La legantoj de "S-ulo" eble interesiĝas pri nia vivo en la malliberejoj de Estonio. Ni ja ne vivas — ni nur pasigas la tempon. La cirkonstancoj en estoniaj malliberejoj estas kruelaj. La malliberejoj kaj en ili reganta ordo estas samaj kiel en carisma reĝimo, ofte eĉ pli maljustaj, ĉar ili ja devenas de ĝi. Samtempe la burĝa registaro deklaras: "Ni ne venĝas per la enkarcerigado, sed ni penos per deca edukado redoni al la socio 'defalintojn'..." Sed la ĉi tie reganta ordo montras tute alion, en la malliberejoj regas nur senkompata venĝo, peno mortigadi la malliberulojn korpe kaj spirite. La administracio kaj la gardistoj kondutas al ni fierege. Laŭ ilia opinio ni ne estas homoj, sed estaĵoj, kiuj ne rajtas havi homajn sentojn kaj dezirojn. La situacio estas pli malbona pro tio, ke la ĉambroj, en kiuj oni nin tenas, estas tro plenigitaj je malliberuloj. Ekzemple, en ĉambro, kies volumeno estas ĉirkaŭe 100 kub. m., estas 20 kaj ofte pli da homoj. Kaj en tiuj ĉambroj oni tenas la homojn dum kelkaj jaroj.

La nutraĵo, kiun oni donas al ni, estas tute nesufiĉa, kelkafoje eĉ netaŭga por manĝado. Por matenmanĝo ni ricevas:

---

ata kiel plej antikva. Ĝi troviĝis en la valo de la riverego Nilo, en Egiptio.

Laŭ prahistoriaj dokumentoj, tie oni trovas homojn jam grupiĝintajn en *nome*-oj (vilaĝoj) 4000 jarojn antaŭ Kristo. Sur monumentoj kaj vazoj oni trovas figurojn de falkoj, de vulturoj, de hundoj, de skorpioj, de fiŝoj, de sagoj ktp. El tio historiistoj hipotezas, ke tiuj bestoj aŭ objektoj reprezentas totemojn aŭ fetiĉojn: "Estas verŝajne, ke la pradinastia Egiptio, inter 4500 kaj 3500 antaŭ Kristo ne ankoraŭ preterpasis la stadion en kiu postrestas tiom da primitivaj societoj: la *klana* reĝimo protektata per fetiĉo aŭ totemo[14])."

La bildoj gravuritaj sur diversaj objektoj rakontas pri la bataloj, kiuj okazis inter la *nome*-oj. La fetiĉoj partoprenis la batalojn, kiel tio vidiĝas per la bildoj. La batalinto ne kredis je sia propra forto; estis la totemo, la fetiĉo, kiu direktis la sagojn kaj tiel mortigis la malamikojn. Malvenko signifis ĉefe la malfortecon de la venkita fetiĉo. Tiel la venkinta fetiĉo sin trudis al ĉiuj venkitoj. La rezulto de tiuj bataloj estis la starigo de du reĝaj regnoj: unu ĉe la Alta kaj alia ĉe la Malalta Egiptio. Ambaŭ reĝoj havis t. n. "parolantajn armilojn". Unu vestis sian kapon per ruĝa kufo, talismano, en kiu loĝis diino; alia portis blankan mitron super kiu ŝvebis la vultur-diino, protektantino de la reĝo. Pli poste ambaŭ kapvestoj kombiniĝos kaj formos la *Psĉenton*, simbolo de la du Egiptioj kuniĝintaj. Por la tiutempaj egiptoj tiuj insignoj posedis magian forton; ili faris miraklojn.

Ĉe la lasta periodo oni konstatas, ke la dio *Horuso* (Falko) akiris la superregecon. Ĝi trudis sian kulton al la tuta Egiptio. Kaj okazis, ke la reĝo finfine fariĝis la viva enkorpiĝo de la dio. La tuta evoluo resumiĝas jene: la iama ĉefo-sorĉisto fariĝas unue la reĝo-pastro kaj fine la reĝo-dio, la Faraono.

La popolo kredas, ke la reĝo-dio posedas la povon briligi la sunon, faligi la pluvon, ĝermigi la grenojn. La Faraono estas la reĝo de l' fajro, reĝo de l' akvo, reĝo de l' rikoltoj. Unuvorte la reĝo-dio posedas magiajn sekretojn tiom potencajn, ke ĉiuj naturaj riĉaĵoj kreiĝas laŭ lia ordono. La Faraono estas la granda "nutranto" de sia popolo.

(Pluo sekvos) *E. Lanty.*

[14]) *Moret* kaj *Davy*.

varman akvon, 8 gr. da sukero kaj sekalpanon 600 gr. tage; por tagmanĝo: 1 litron da supo, kiu estas kuirita plejparte el terpomoj kaj hordea grio, ankaŭ viandon oni metas en la supon, sed tiom malmulte, ke tre malofte oni trovas ĝin (1 kg. por 120 personoj!); por vespermanĝo: varman akvon, 5 terpomojn kun salo. Kompreneble, ke tiu densa kunvivo kaj nesufiĉa, ofte sentaŭga nutraĵo kaŭzas malsanojn. En okazo de malsaniĝo oni donas preskaŭ nenian kuracistan helpon, ĝis la situacio de la malsanulo fariĝas tre danĝera, oni lin translokigas en malsanulejon, kiu ne similas al malsanulejo. Ĉi tie diversaj parazitoj rampas kaj disportas la malsanon. Ĝenerale la cirkonstancoj en la malsanulejo-turmentejo estas tiaj, ke malsanuloj tre malofte resaniĝas, sed pli ofte ili restas tie kaj mortas.

La plimulto el la malliberuloj estas devigataj labori. La laboro estas peza kaj malsaniga, daŭras 8 ĝis 10 horojn. La salajro — 25 mk. tage (1 dolaro = 380 mk.). Se iu ne estas laborkapabla pro la nesufiĉa nutrado, li estas punata kaj persekutata. La metiistoj laboras kaj loĝas en la samaj ejoj. Jen higieno! La malliberuloj estas tre ofte punataj pro gravetaj kaŭzoj. Oni punas per karcero por 3—5—7 ĝis 50 tagoj. En karceroj oni donas nur en ĉiu dua tago varman manĝaĵon. Esti semajnon en la eta kelo sen lumo, sen ĉia homa bezonaĵo, — ĉu tio ne estas mezepoka inkvizicio? Tia estas nia vivo. Nur ĉiu unua dimanĉo de la monato estas pli bona, tiam niaj parencoj rajtas nin viziti. Kun la vizitantoj ni povas interparoli, tra la duobla densa krado, dum 15 minutoj. Oni permesas paroli nur banalajn frazojn; se oni rimarkas ion malpermesitan — inter la kradoj estas la gardistoj — la vizitado estas tuj ĉesigata.

En monato estas permesate skribi al parencoj nur unu leteron. Gazetojn ni ricevas nur post du semajnoj, kaj se estas en la ĉambro subjuĝato, tiam oni donas ilin nur post du monatoj; tamen nur burĝaj figazetoj estas permesataj. Nia ĉiutaga vivo komencas kaj finiĝas per malbonsona fajfado. Se iu post vespera fajfado ne dormas — tiu povos troviĝi en la karcero.

El ĉiu milo da loĝantoj de blankterora Estonio en la malliberejoj sidas tri homoj. El la malliberuloj proksimume 15% estas politikuloj, inter ili kelkaj dekoj da K-dinoj. Estas Gek-doj, kiuj troviĝas jam ĝis 7 jaroj inter la muroj. La verdiktoj estas por Gek-doj tre severaj: plejparte punoj estas ok, dek, dekkvin-jaraj, dumvivaj.

Kiel ajn malbonaj estas niaj cirkonstancoj, kiel ajn dikaj la muroj, tamen ni scias, ke seruroj ne estas eternaj, ke la tempo de blanka teroro de la reakcio iam finiĝos! Ni scias, ke nur aktiva ago de laboristoj en la tago de la revolucio liberigos nin kaj ĉiujn laboristojn!

Ni-el-Mallibero.

MIA BUĜETO

La laŭdindan ekzemplon, donitan de K-do 2978 en n-o 157 de "S-ulo" mi volas sekvi samsincere kiel la angla K-do. Tiel ni, SAT-anoj, sendube pli alproksimigas nin reciproke, kaj tion mi taksas tre grava por niaj celoj.

Nuntempe mi estas 48-jara. Antaŭ 26 jaroj mi fariĝis suba poŝta oficisto en urbego L. Tiam la "imperiestra poŝto germana" salajris "malavare" siajn plej malaltajn oficistojn. Por 11-hora taglaboro mi ricevis 75 mk. monate, kiam mi en 1905 edziĝis. Post depreno de 22,50 mk. por loĝeja luprezo kaj 5 mk. por la ŝtata imposto, restis nur 47,50 mk. por kontentigi ĉiujn vivbezonaĵojn de la edzino, unu infano kaj mi.

Dum la venontaj jaroj iom post iom pliboniĝis la salajro, kiu ĉiam estis kaj ankoraŭ hodiaŭ estas mia sola enspezo. Parte aŭtomate kaj parte per sukcese plenumitaj ekzamenoj mi trapasis la kvin malaltajn salajrogrupojn. En 1924 mi trafis fine la plej altan ŝtupon de suboficisto atingeblan, nome la 6-an grupon. Ĝi jam apartenas al la gruparo de la meza oficistaro.

Entute mi ricevas nun jare 3 624 mk. kaj sekve 302 mk. monate.

Tiu ĉi sumo konsistas el:

		monate
nura salajro	2 280,— mk.	190,— mk.
krompago por loĝejo	672,— „	56,— „
krompago por edzino	144,— „	12,— „
krompago por du infanoj	528,— „	44,— „
	3 624,— mk.	302,— mk.

Miaj du 15-jaraj gefiloj vizitas ankoraŭ "pli altan lernejon" kaj nur tiom longe, kiom infanoj aŭ vizitas lernejon aŭ regule lernas profesion, la krompago por ili estas donata. Mia tria infano depost kelkaj jaroj perlaboras sian vivtenadon mem kiel kontoristino.

Jare mi ricevas 31 tagojn da libertempo, dum kiu mi kun la edzino forvojaĝas por pasigi ĝin en la montaro kaj refreŝigi tie korpon kaj menson. Certa sumo tial ĉiumonate estas ŝparata.

Nur ĉiu dua dimanĉo estas libera por mi kaj la alian mi devas deĵori.

Jen miaj elspezoj:

		monate
dommastrumado	1 560,— mk.	130,— mk.
loĝeja pago	420,— „	35,— „
ŝtata imposto	169,20 „	14,10 „
vestaĵoj, ŝuoj ktp.	400,— „	33,33 „
gaso por kuirado	60,— „	5,— „
elektra lumo	36,— „	3,— „
karbo vintra	36,— „	3,— „
asekuro por senpage konsulti kuraciston k. ricevi kuracilojn	60,— „	5,— „
vivasekuro	30,— „	2,50 „
asekuro kontraŭ forbruligo kaj ŝtelo de mebloj	9,60 „	—,80 „
lavaĵoj	120,— „	10,— „
poŝta sindikato	24,— „	2,— „
partia kotizo (ankaŭ edzino)	18,— „	1,50 „
liberpensula kotizo (ankaŭ edzino) k. postmorta forbruligo	16,80 „	1,40 „
"La naturamikoj"	9,60 „	—,80 „
SAT, "S-ulo" k. "S.R."	10,50 „	—,90 „
loka grupo esper.	7,20 „	—,60 „
gazeto	36,— „	3,— „
violoninstruo al filo	60,— „	5,— „
teatra abono	42,— „	3,50 „
libertempa ŝparo	180,— „	15,— „
subteno al la 81-jara patrino	120,— „	10,— „
lernejlibroj	60,— „	5,— „
diversaĵoj	139,10 „	11,60 „
	3 624,— mk.	302,03 mk.

La tabelo estas tute fidinda, ĉar depost jaroj mi zorge notas ĉiujn en- k. elspezojn. Favoraj cirkonstancoj, kreitaj de la proletara plimulto en nia urba deputitaro, kaŭzis, ke mi ne bezonas pagi la lernejvizitadon de miaj infanoj. Alimaniere la elspezoj pliiĝus ankorau je 240 mk. jare. Ĉar poŝta oficisto rajtas iam ricevi pension, ne necesas por mi ŝpari.

Post kelkaj semajnoj verŝajne oni leĝigos plialtigon de la salajroj ŝtatoficistaj kaj mi kredas profiti el tio eble 30 mk. monate. Tiam unue mi plenumos la deziron de mia edzino je plialtigo de la mastrumadmonsumo.

Iu el Saksio (135).

La kapitalistaro estas demonaro

Ĝia maniero de agado ankaŭ estas maliceco. Ĉu ni, Gek-doj, devas subteni ĝian hombuĉadon? Ĉu ni pli volonte ne devas prepari kontraŭbuĉadon al ĝi? Ĉu ni, laboristoj, estas servutuloj al la tiraneco? Ni certe ne estas, ni mem povas helpi unu la alian por domaĝi al niaj malamikoj. Nun estas tempo por agado. Kiu donis al la tiraneco tiun ordonon, ke ni estu servutuloj al ĝi? La plej granda krueleco estas la milito, kiun niaj burĝaj timonĉevaloj preparas. Pensu ĉiuj virinoj kaj infanoj pri la tempo, kiam iliaj patroj estas forrabitaj el ili. Estas mia plej granda deziro, ke ni ĉiuj laboristoj kontraŭbatalu la militon kaj la tiranaron tutmondan.

(7780)

HUMORAĴO

La "biblia" Britio

La britaj episkopoj vojaĝas eksterordinare multe. Lige kun tio ĉi, estas rakontata gaja anekdoto pri la Oxford'a episkopo D-ro Stubs. La episkopo revizis iun lernejon kaj demandis lernanton, diri al li, kiun libron plej multe legas la episkopo. La lernanto respondis: "La biblion!" "Ne estas vere!" — diris la episkopo. "Mi diras tion al vi. Episkopo en Britio plej multe legas la Horaron de la vagonaroj, ĉar li pasigas la plej grandan parton el la tempo en la vagonaroj".

La parolon havas niaj britiaj K-doj.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

Ni publikigas ĉi sube parton el dokumento, pri kies graveco ĉiu leganto bone konscios. Ĉiu ankaŭ volos laŭpove klopodi por sukcesigi nian lingvon. Ĉi dokumento aperis en la oktobra n-o de la Bulteno de I.T.F. (Internacia Federacio de Transportlaboristoj). Kvankam ĝi estas sen subskribo, estas evidente, ke verkis ĝin K-do Nathans.

INTERNACIA FEDERACIO SINDIKATA (Amsterdam) pri la internacia lingvo

La I.F.S. skribas al ni la jenon:

"La internacia sindikata kongreso, okazinta en Parizo, voĉdonis la sekvantan rezolucion: La Internacia Federacio Sindikata estas rajtigita ekzameni la eblecon kaj uzon de difinita aŭ de helpa lingvo kiel interkomprenigilo ĉe la kongresoj de la Internacia Federacio Sindikata, kaj studi kio povos eventuale esti entreprenata de la Internacia Federacio Sindikata por eviti, dum internaciaj kongresoj de la laborista movado, la tradukojn, kiuj forprenas multe da tempo kaj malhelpas la laborojn.

Antaŭ ol fari klopodojn pri tiu demando, ni volus peti la naciajn centrejojn kaj profesiajn sekretariejojn internaciajn fari al ni la sugestojn, kiujn ili konsideras oportunaj, kaj proponi al ni eventuale la uzon de difinita aŭ de helpa lingvo."

Ni respondis la jenon:

"La uzo nun ankoraŭ farata en nia movado de tiom da diversaj lingvoj, kaŭzas unuflanke grandan malŝparon de mono, tempo kaj energio, kaj aliflanke ofte, spite ĉiuj zorgoj kaj elspezoj, miskomprenojn kaj konfuzojn. Kiam la internacia afero pligraviĝos, tiuj maloportunaĵoj ankoraŭ pligrandiĝos, kio faras, ke fine ni tute embarasiĝos en niaj laboroj, tiom pli, ke kelkaj indikoj antaŭvidigas jam nun, ke, se ni daŭrigos tiamaniere, la nombro de la landoj pretendantaj, ke ilia lingvo devas esti uzata en la internacia afero, ankoraŭ pligrandiĝos. La fakto, ke oni bezonas lingvajn konojn por povi dece partopreni la debatojn de internacia intereso, kaŭzas la danĝeron, ke personoj, posedantaj alirilate ĉiujn postulatajn ecojn, ne povas eniri la unuajn vicojn, por utiligi siajn kapablojn en nia movado.

Ŝajnas utopia kredi, ke iu el la ekzistantaj naciaj lingvoj estos utiligata kiel internacia esprimilo. Krom tio necesus, por posedi sufiĉe kiun ajn el tiuj lingvoj, ke la agitantoj en nia movado dediĉu al ĝia studado multan penon kaj tempon. La neŭtra helpa lingvo esperanto, kiun oni povas ellerni ĝisfunde dum multe pli mallonga tempo kaj kun multe pli malgranda peno ol kiun ajn nacian lingvon, liveras al ni solvon de la lingva problemo, kies graveco ĉiam pli kaj pli sentiĝas en nia movado. ...

Ni atentigas vin pli speciale pri la rezolucio, represita en nia Bulteno, voĉdonita de la laborista grupo ĉe la oka internacia labor-konferenco. Ĉeestante internacian esperantistan kongreson, vi certe konvinkiĝos, kiel okazis ankaŭ kun ni[1]), ke esperanto respondas efektive al ĉiuj postuloj pri lingvo internacia.

En nia oficejo, esperanto faras jam nun utilajn servojn por la korespondado.

Fundamenta Krestomatio

Ekzercoj, fabeloj kaj legendoj, rakontoj, el la vivo kaj sciencoj, artikoloj pri esperanto, poezioj

Unu volumo in-16, 460-paĝa (10-a eld.)

Prezo: 2.50 mk. g.

La *libro de ĉiuj* oni povus nomi la Fundamentan Krestomation. Post *Fundamento de Esperanto* ĝi estas la verko la plej grava, kiun ĉiu esperantisto devas koni. D-ro Zamenhof tiris mem el siaj verkoj, kaj el la verkoj de la plej bonaj esperantistaj verkistoj, ĉiujn artikolojn, kiuj estas en ĝi. La libro entenas ĉarmoplenajn legendojn, interesajn rakontojn, anekdotojn, lingvajn kaj sciencajn artikolojn, ktp. Fine belegan kolekton da 70 poezioj, el miaj plej lertaj esperantistaj poetoj. Ĉio estas zorge gradigita, kio faciligas ĝian akiron al la novaj esperantistoj.

Havebla ĉe Administracio de SAT.

Konsiderante ĉiujn ĉi aferojn, la Ĝenerala Konsilantaro jam esprimis sin en 1925 favore al disvastigo kiel eble plej larĝa de esperanto-kono inter la membroj de la aliĝintaj organizoj. La I.F.S. faros, laŭ ni, utilan aferon, komencante, flanke de sia alia laboro, energie la propagandon favore al esperanto kaj okupiĝante — eventuale post konsulto de la aliaj organizoj de la laborista movado — ke tiu ĉi lingvo estu enskribita en la programo de la lernejoj. Atendante tiun rezulton kaj por substreki tiun ĉi bondeziron, la I. F. S. devus inviti la centrejojn sindikatajn aliĝintajn kaj ties organizojn, dissciigi la konon de esperanto per kursoj kaj publikigaĵoj en la sindikataj organoj. En la proksima kongreso de la I.F.S., raporto de via Ĝenerala Konsilantaro koncerne la rezultojn de la komencita de vi enketo pri la uzo jam farata de esperanto, povus servi kiel bazo por la diskutoj koncerne la enkondukon de ĉi helpa lingvo en la praktika aktiveco de nia internacia movado."

[1]) K-do Nathans aludas pri sia ĉeesto en nia Brusela SAT-Kongreso.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Aŭstrio. Laŭ propono de A.L.L.E. okazis en *Knittelfeld* Komence de oktobro n. j. varba semajno por esperantigo de la Laboristaro. La paroladoj k. ekspozicio estis bone vizititaj. Sukceso kontentiga. Sekvis kursoj. Ankaŭ en najbara industria vilaĝo *Zeltweg* K-do Pavlik gvidas kurson. Multaj jam komprenas la valoron de esp-o. — **Bulgario.** Lastatempe en *Sofia* oni sentas la ĝojigan fakton, ke la intereso al esp-o inter la laboristoj estas pligrandigita. Fondiĝas lab. esp. grupo. La neŭtrala esp. movado velkas, kiel oni devas atendi. — **Nederlando.** En *Amsterdam* funkcias 6 kursoj kun po 2 gvidantoj. Sekvos pluaj kursoj, kvankam gvidantoj mankas. La grupo estas tutsanega kaj la membroj aktive partoprenas la laboron, la salono fariĝis jam tro malgranda por la kunvenoj. La instruadon oni faras laŭ Petro. La SAT-grupo en *Leiden* organizas serion da paroladoj. La ĝis nun okazintaj kunvenoj plene sukcesis. Du kursoj kun 35 p. — **Sovetio.** En *Krasnodar* funkcias jam du novefonditaj esp. rondetoj, kun 93 m. Estas organizataj rondetoj ĉe la fervojista klubo, ĉe kubana industria teknikumo, ĉe la laborista klubo "Profintern". La distrikta "politprosvet" estas dissendinta al 190 vilaĝaj legejoj kaj "ruĝaj anguletoj" leteron pri neceso de studado kaj praktika aplikado de esp-o. En *Ŝadrinsk* antaŭ unu jaro estas organizita malgranda 6-membra rondeto por lernado de esp-o ĉe redakcio de loka ĵurnalo. Nun estas 6 SAT-anoj, ĉelo de SEU, du rondetoj kun 23 lernantoj. En la distrikto 51 personoj, plejparte kamparanoj, lernas esp-on. Estas organizata distrikta komitato de SEU. — **Usono.** La 30. 10. 27 la Ferrera Moderna Lernejo en *Nov-Jorko* solenis Memorfeston al granda martiro Francisko Ferrer, kiun la hispana registaro pafmortigis la 13. 10. 1909. Ĉeestis la du frataj lernejoj el la antaŭurboj Bronkson k. Brooklyn, same la grupoj de la Mondjunularo, la Naturamikoj k. la germanaj Migrobirdoj. La vere internaciaj gazetoj laboristaj anoncis la feston ĉe kiu oni kantis angle k. esp-e. La radikale pensanta parto de la tiea grupo de germanaj "Wandervögel" (vanderfjogel, migrobirdoj) havis grandan kunvenon dum la tagoj de 15. k. 16. oktobro. Ĉeestis pli ol 80 gejunuloj, havantaj reprezentantojn de la Jugendgemeinschaft, Kronacher Bund, Pachanten, Community Youth k. el urboj Philadelphia, Patterson k. Newark. La aranĝintoj estis K-do Rother k. Adler, instruisto ĉe la Ferrera Lernejo. Ili ankaŭ decidis lerni esp-on.

*

NIA POŜTO

1311, 6351. — Ricevita kaj aperos. *Red.*

NEKROLOGO

La 19-an de Oktobro 1927 mortiĝis nia kara K-do Alfred Kurtz (10 063).

Honoron al lia memoro!

SAT-anoj de Gr. Röhrsdorf i. Sa. Germanio.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO, dua parto — la movado 1900—1927, de Edmond Privat. Eldono de Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, 1927, Esperanto-Fako. Formato 19×12½ cm., 199 pĝ., tole bindita. Prezo: 6 g. mk.

Tre alloga estas la titolo kaj la eldono mem. Tio igis nin kun speciala atento, intereso kaj plezuro malfermi la verkon de la fama esp. oratoro. Ĝia legado estis ofte vera plezuro. Kiel en la unua parto, aperinta antaŭ dekkvino da jaroj, tiel ankaŭ en tiu ĉi, la aŭtoro majstre scias nin gvidi en 29 ĉapitroj tra ĉiuj stadioj de nia komuna lingvo. Dum en la unua li rakontis detale pri la *propaganda* periodo, en la dua parto li trakuras la *aplikan periodon de la disvolvo* de esperanto, kiu jam havas sian propran, memstaran, nedependan de la "mondlingva movado" historion. Tiun ĉi el *lingva* vidpunkto pli detale devas trastudi iam lingvistoj kaj doktorkandidatoj.

La aŭtoro, memkompreneble, ne povis ignori la esp. laboristan movadon, kaj unu el la ĉapitroj portas la titolon "ĈE LA LABORISTOJ (1921—1925)". Tie ĉi tamen li estas tre ŝparema, tro konciza kaj ofte malpreciza. Ĉu decis prisilenti, ke la publikigo en "Le Travailleur Espérantiste" de leteroj de R. Rolland, de H. Barbusse kaj aliaj famuloj tre helpis la reviglîĝon de la tuta esp.-movado post la militĉeso? Ĉu decis prisilenti, ke fama sciencisto kiel A. Einstein konsentis esti la honorprezidanto de unu SAT-Kongreso? Kiam la aŭtoro tiom komplezeme rakontas en aliaj partoj pri malgravaĵoj, oni emas pensi, ke li skribis ĉi tiun ĉapitron ne kun kontenteco, sed kiel lernanto, faranta puntaskon. Kial diri, ekzemple, ke "*Sennacieca Revuo*" fariĝis "*Sennaciulo*", dum fakte ĉi lasta estas tute nova gazeto, ĉar "SR." daŭras aperi? Multajn similajn rimarkojn oni povus fari. Per ĉi ĉapitro s-ro Privat "anstataŭ pentri brovojn, eltiris la okulojn", kiel diras proverbo. Estus eble pli bone, se li tute ne tuŝus tiun demandon, pri kiu necesas tuta historilibro.

La stilo estas Privat-a: facila kaj harmonia, kiel lia parolo. Ni ne povas nin deteni de la tento citi ekz. la jenon:

"'Laŭ internacia vidpunkto Esperanto videble marŝis al ĉiam pli granda unueco. Se iam kreiĝus en ĝi dialektoj per uzado, tio povus okazi ne laŭnacie, sed eble laŭklase sur tutmonda kampo."

Sed la gramatikaj kaj aliaj eraroj estas tiel abundaj, ke ni miregas, kiel "Heroldo de Esperanto" povis nomi tiun verkon "kronon meritanta"... Kompreneble, ni ne pretendas instrui akademianon, sed ni vidas, ke li nenion lernis el kritikoj, kiel tiu de sia kolego P. Corret pri la "Vivo de Zamenhof" en "Ll." de aŭg.—dec. 1920. Multaj el la samaj eraroj ripetiĝas kaj tio nur pruvas, ke ili ne estas simplaj preseraroj. Manko aŭ trouzo de akuzativo ĉe datoj post prepozicioj, nenecesa uzo de novaj vortoj, maluzo de sufiksoj necesaj, aliigo de l' senco de oficialaj vortoj, kripligo de propraj nomoj ktp. Ni remalfermu la belan libron:

Pĝ. 20, ĉiu alparolis unu la alian kvazaŭ bone konatoj*n;* pĝ. 29, *la* Ekzercaro, *la* Universala Vortaro, dum, 3 liniojn pli supre, la artikolo mankas antaŭ Fundamento, cetere nenecesa antaŭ nomo de titoloj; pĝ. 33, Aŭstrujanojn; pĝ. 38, ad*o*ptiĝis, *nekontesteble;* pĝ. 52 (ĝusta uzo): okazis la 29-an de Majo, respondis la 4-an de Dec., same sur pĝ. 60 ĝis 61: la 7-an de Jan., de (la) 6-a Nov., de la 4-a de Jan., de 14-a de Dec. ... dum sur pĝ. 107 (malĝusta): de 31-a*n* de Okt., de la 11-a*n* de Jan., de la 27-a*n* de Julio, iom pli malsupre denove ĝuste: de la 30-a de Okt., sur sekv. pĝ ree malĝuste: de la 21-a*n* de Nov., de 29-a*n* de Marto, de la 15-a*n* de Majo ktp.... Pĝ. 54, lukti *kun* (anst. kontraŭ); 59, 83, en *la* Ll.; 75, sidas 9 jaro*j(n);* 77 k. 121, 155, *standon* (germanismo!); 88, krom D-ro Zamenhof-o*n;* 98, naci*an*ismoj; 102, organiz*aĵ*oj, dum sur aliaj pĝ. nur organizoj (kia malkonstanteco!); 109, tiaj lecionoj komen*cis*, la afero nur komen*cis* (anst. komenc*iĝ*is). Pĝ. 111, junuloj kaj *adultuloj* (nova senco, anst. plenkreskuloj!); 120, ree: je la 2-a*n* ĝis 4-a*n* de Aprilo; 126, *adultaj* personoj, dum *la* Aŭgusto (eble *monato* mankas, alimaniere *la* estas superflua), *demonstracioj* (anst. manifestacioj), 131, Portugal*o*; 134, *preso* (anst. gazetaro); 147, *re*proksimigo; 166, deko *de* lecionoj; 175, *prelegadis*- kaj tuj sube *lekci*ojn; 183, la bela Zamenhof'a verso "Nun de loko flugu ĝi al loko" tekstas ĉe Privat "Nun ĝi flugu de loko al loko; E*l*ska, Frenke*ll* (kun troa l); 189, tiel *ĉi* (?!), ne enkalkulante la kelkajn preserarojn, kiel *in*, universal*o* tranŝeo k. s.

Ni esperu, ke ĉe *dua* eldono, s-ro d-ro Privat "elokventigos" ankaŭ sian *skriban* parolon. *I. H. K.*

AŬSTRALIO, lando kaj popolo, originale verkita de A. Delsudo kaj Lauri Laiho. Sama eldonejo. Formato: 21×14 cm., 95 pĝ., multilustrita kaj tole bindita. Prezo: 6 g. mk.

Ĉu vi estas propagandisto kaj volas konverti al esp-o "Tomasojn", ĉu vi estas sciencamanto kaj volas penetri spirite en tiun ekzotikan landon, ĉu vi estas vojaĝemulo kaj volas havi fidindan gvidilon, venigu al vi tuj la ĉi supran ekstere kaj interne belegan verkon. *I. H. K.*

EL LA INTIMA LIBRO de la VERD-URBAJ ESPERANTISTOJ. Skizoj el la esperantista vivo, de ADA. Sofia, 1927. Eldono de l'aŭtoro: At. D. Atanasov, Oboriŝte 68, Sofia (Bulg.). Formato: 17×12 cm., 67 pĝ. Prezo: 0,60 sv. fr. (15 bulg. lv.).

Jen gramatike kaj stile senerara verketo, malofta en la esp.-literaturo. En modelaj bildoj prezentas al ni la konata aŭtoro Ada tutan esperantan mondon, plenan esperantan vivon kun ĉiuj ĝiaj ĝojoj kaj malĝojoj. Ni bedaŭras, ke la spaco de nia gazeto ne permesas al ni citi kelkajn el tiuj perloj. Tre instruaj estas "La longaj oreloj", "Testamento" kaj "La veturilo", kaj edifaj "La paroloj de l' sperto". Nur en la unuakta teatraĵeto "Reveno" ni ne komprenas, kiel tro rapide kaj naive povas la forlasita heroo Teodoro reveni al ... virina amo. Ni varme rekomendas la verketon, meritantan pli bonan veston. Kiu ĝin legos, tiu parolos *ade* pri la stilo Ada. *I. H. K.*

*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":

Novini, Sofia, n-o 63: El Blankrusio; Reboniga agrikultura kolonio por malliberuloj apud Kurgan. — *Rabotniĉesko delo*, Sofia, 20. 10. 27: Sana stato de la germana popolo.

Tradukis el esperantaj leteroj:

Massovik, 21. 10. 27.

Enhavis priesperantajn artikolojn:

Bulletin d'Information de la FIT., Amsterdam, okt. 27 (vidu sub "Ĉe la laboruloj"). — *Revista Popular*, Córdoba, 1. 11. 27 (de E. Lanty).

Fermu viajn leterojn per niaj sigelmarkoj.
Prezo: 100 pecoj 1.— mk. g.
Administracio de SAT.

Ni ricevis jenan leteron, kiun ni publikigas, ne aldonante ian komenton:

Ankoraŭfoje pri ĉapelafero

Unue mi volas korekti la komunikaĵon de la redaktoro, pri la aperigo de mia artikolo. Mi ricevis sciigon de K-do Lanty, ke la diskuttemo estas tiom ne interesa, ke domaĝas por la loko aperigi la artikolon. Sed ĉar multaj K-doj respondis al la temo, mallonga resumado estas farota. Konsiderante la respondon de K-do Lanty, mi rezignis la aperigon de la artikolo, sed ne konsentis, ke ĝi estu uzata en resumado.

Mi publike protestas kontraŭ la malmodesta uzo de redaktoraj rajtoj, ke malgraŭ mia peto, kiun aŭtoran rajton ĉiu redakcio devas konsideri, nia redakcio uzis ĝian enhavon en formo de kastrita kriplaĵo en la kadro de resumado.

Certe estas kiom da kapoj, tiom da ĉapoj, sed la redakcio ne opiniu, ke ĝia ĉapo taŭgas por ĉiu kapo. *Neniu.*

ALVOKO!

Kiu konis mian fraton **Johano Erjuĥin** (estinta rusa soldato en Francio)? Depost 1919 li nenion skribis al la familianoj. Kredeble li mortis en **Saloniki** (Grekio). Pro respondo mi estos kore danka. **A. Erjuĥin**, PTT-Kontoro, **Arĥangelsk** (Sovetio). **?**

! **ALVOKO!**

Al ĉiuj laboristaj esperantistaj organizoj.

Bogorodskaj (Sovetio, Mosk. gub.) geesperantistoj la 20-an de novembro aranĝas sian unuan tutujezdan konferencon kun ĉeesto de reprezentantoj el partiaj, sindikataj kaj sociaj organoj. Urĝe sendu al ni Viajn salutleterojn, kiujn ni rekompencos laŭ Viaj deziroj. Helpu al ni!

Adreso: K-do **Jarov, V.**, Kooperativnaja, 10, **Bogorodsk** (Mosk. gub., Sov.)

Alumetojn! ——•

bonajn, malkarajn, mi volas importadi en Anglion. Kiu povas peradi?
C. Fielding, 53, Diana St., **Cardiff** (Anglio).

ENHAVO:

Ĥaoso en Britia Karbminindustrio, de W. Henthorne . . . pĝ. 49
Situacio de elektro-laborantoj en Zagreb, de 6083 . . . . . . „ 49—50
Vivo en la Usono Armeo, de P. Crouch . . . . „ 50—51
Kretscham-Rothensehma, de 125 „ 51—52
Kooperativa movado en Germanio, de 3018 . . . . „ 52
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo, de E. Lanty . . „ 52—53
Usonaj ministoj strikadas jam ses monatojn, de 1307 . . . . . „ 53
Pri Raciigado, trad. I. H. K. . . . „ 53
Nia Vivo, Ni-el-Mallibero . . . . „ 53—54
Mia buĝeto, de 135 . . . . „ 54
La kapitalistaro estas demonaro, de 7780 . . . . „ 54
Humoraĵo, de I. H. K. . . . . . . „ 54
Tra Esperantio . . . . „ 55—56
Anoncoj . . . . „ 56

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)